



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 4 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Cefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

A. SEKELJ:

PAPERKANONOJ

El «IOE-Gazeto» ni permesas al ni tondi ĉi tiun artikolon, kiu devus ja esti legita de ĉiuj.

Pluraj niaj kunlaborantoj demandas: kion mi, simpla esperantisto, povas fari por IOE? Mi respondas: nenion vi devas fari por IOE, ĉar IOE ne estas celo por si mem, ĝi ne estas fondita por kunligi esperantistojn, sed kolekti akvivilojn, kiuj laboros ne por IOE, sed por Esperanto, por alproksimigo de Esperanto al ĝia oficialigo per ĉiam pli ofta uzado en la praktiko.

Ĉu mi teoriumas? Ĉu mi predikas? Nia slogano ja estas **PLI VALORA LA PRAKTIKO OL CENHORA PREDIKO!** Ni transiru, do, al la praktiko.

Jen tasko kiun tre facile povas plenumi ne nur ĉiu nia kunlaboranto, sed ĉiu esperantisto, sendepende kie li vivas kaj ĉu en lia loko ekzistas ankaŭ aliaj esperantistoj aŭ ne. La ideo estas malnova, ni aprobas ĝin kaj entreprenos ĝian efektivigon.

Ĉi tiu jaro estas proklamita Internacia jaro de turismo. Nia imperativo estas: nepre dum tiu jaro penetrigi Esperanton en la turismon.

Turistoficejoj, hoteloj, trafikentrepenoj ktp ne estas interesitaj dungi esperantiston aŭ lerni Esperanton, ĉar anstataŭ ilian servon la esperantistoj uzas proprajn privatajn servojn (v. mian artikolon en n-ro 4 de 1966). Se ni dum la Internacia jaro de turismo rezignos pri la uzado de tiuj servoj de esperantistoj mem, kaj bombardos per organizita kanonado la entreprenojn, ili vole-nevole devos ŝanĝi sian sintenon. Ankaŭ ĝis nun

multaj proponis ke «oni» skribu informpetojn al turistoficejoj, radiostacioj ktp, sed tio okazis sen koordinado kaj «kelkaj» oficejoj ricevis «kelkajn» informpetojn kaj — nenio ŝanĝiĝis.

Nun ni direktu niajn PAPERKANONOJN el la tuta mondo dum unu monato al 20 elektitaj adresoj, tiel ke ili estu vere superŝutataj per informpetoj kaj postuloj de Esperantaj prospektoj. Tiel almenaŭ 10 el tiuj 20 decidos priatenti Esperanton. Se krom la informpetoj ankaŭ persone venos al ili kelkaj esperantistoj dum la jaro, tiu entreprenado estos certe venkita.

IOE-Gazeto ĉiumonate aperigos sub la sama titolo novajn 20 adresojn (bonvolu sendi al ni proponojn tiurilate, sed el unu lando unu proponanto sendu nur unu adreson, kiun li konsideras la plej grava, kaj ni elektos el ĉiu lando tiun kies adreson la plejmulto alsendis), kaj ĉiu esperantisto estas petata **NEPRE SENDI ALMENAŬ 3 LETEROJN** al 3 adresoj el la listo, sed ne al lando kie oni parolas la lingvon de la sendanto. Do nia artilerio havos centojn da PAPERKANONOJ, direktitajn ĉiumonate koncentrite al 20 celoj. Rezulto ne povas manki. La sieĝita fortikaĵo devos kapitulaci. Jen la unua listo:

1) Oberösterreichisches Landesfremdenverkehrsamt, Hauptplatz 9, Linz/Donau, Aŭstrujo.

- 2) Servo por Propagando kaj Turismo, Pelikaanstraat 6, Antwerpen, Belgujo.
- 3) CEDOK, Praha, Ĉeĥoslovakio.
- 4) Hotel DANIA, Silkeborg, Danlando.
- 5) Bureau National de Renseignements de Tourisme, 127, av. des. Champs-Élysées, PARIS 8-ème, Francujo.
- 6) B'lgarski Turistiĉesk S'juz — Gradski Savet — Bul. «Ruski» 8, SOFIA, Bulgario.
- 7) IBUSZ, Szécsényi tér 9/11, PÉCS, Hungario (postulu prospektojn de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo).
- 8) Ente Provinciale per il Turismo, Piazza Duomo 5, PARMA, Italujo.
- 9) «Putnik», turistagentejo, Dragoslava Jovanovica 1, Beograd, Jugoslavio.
- 10) V.V.V., Stationsplein 45, ARNHEIM, Nederlando. (Petu prospekton).
- 11) JUVENTUR, Alej Roz 2, WAR-SZAWA 61, Pollando.
- 12) TURISTBYRÄN, Drottningtorget, GÖTEBORG C., Svedlando.
- 13) Schweizerisches Verkehrhaus, Lidostrasse, CH 6000 LUZERN, Svislando.
- 14) Tours Department, Peltours Ltd., 29, Duke Street, LONDON W. I. Britujo.
- 15) Fremdenverkehrs- und Kongress-Zentrale e V., HAMBURG 1, GERMANA FED. RESP.
- 16) A/S LARVIK - FREDRIKSHAVN-FERJEN, Postbox 2443, OSLO 2, Norvegujo (trafiko inter Danlando kaj Norvegujo).
- 17) Hotel SIMON, str. Garcia Vinuesa 21, SEVILLA, Hispanujo.
- 18) New York Convention and Visitors Bureau Inc., Pershing Square 90, East 42nd Street, NEW YORK, 17, N. Y. Usono.
- 19) Tourist Information Center, Kyoto Tower Bldg, Higashi-Shiokojicho, Shimogyo-ku, KIOTO, Japanujo.
- 20) INTURIST, Prospekt Marksa 16, MOSKVA, Sovetio.

Poste la paperkanonado estos direktata ankaŭ la aliaj branĉoj kaj fakoj. La unuajn rezultojn ni atendas en turismo.

«ESPERANTO EN KOMERCO»

kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo g. m. 2,—; ekde 10 libroj g. m. 1,35. Esperanto-Rondo, 718, Crailsheim, Germanujo.

LA MOTACILO

(Motacilo alba = moviĝema, blanka).

Pluvo, suno kaj sudvento kune forbalas la lastajn restojn de la neĝo. La suno kapablas iom varmigi. La aero sentiĝas pli varma kaj la insektoj komencas moviĝi.

Sur la firsto sidas la *sturno* grincante kaj fajfante, — nu, estas tamen ĝia maniero laŭdi la printempon.

Sed aŭskulta! Pliritt, pliritt, pliritt, — jes, vere la *motacilo* venis! Ĝi gracia, rapidmova birdo kun la blankaj vangoj, nigra kapuĉo kaj gorĝo kaj la longa vosto. Bela, svelta kaj eleganta ĝi sidas sur la ĝardena barilo kaj kapsignas, balanacnte la longan voston. — Ĝi salutas el la sudo.

La motacilo venis, oni povas legi en la gazetoj. Estas granda novaĵo rakonti, ke tiu nobla gasto venis vojaĝante tute el Nord-Afriko por pasigi la someron ĉe ni.

Apenaŭ iu birdo estas tiel sopirata dum la printempo kiel la motacilo. Ĝi estas amata de ĉiuj, junaj kaj maljunaj. Ni ĝuas la vidaĵon kiam ĝi ĉirkaŭsaltetas sur la korto.

Se la printempo venas modere frue, vi povas kutime esti certa aŭdi kaj vidi la motacilon en la dua semajno de aprilo. Rimarku, kiun parton de la birdo vi ekvidas unue. Nome ne aŭguras ion bonan, se vi unue ekvidas la nigran gorĝon.

La virbirdo venas unue, la ino kelkajn tagojn pli poste. Tiam ili vetkuras, kaptante insektojn, kaj en kelkaj liberaj momentoj ili ludas kie' ĝojaj infanoj.

Kiam la virbirdo en majo svatiras, ĝi kondutas kvazaŭ vera komikulo. Tiam ĝi senĉese balancas la kapon, disetendas la voston kaj saltetas ĉirkaŭ la ino. Se rivalo proksimiĝas, tuj ekestas batalo. Se ĝi post multa bruo kaj tumulto sukcesis forigi sian turmentanton, ĝi triumfe revenas. Ĝi kunprenas la motacilon kaj kune ili forflugas por konstrui hejmon.

La motacilo nestas en la plej nepenseblaj lokoj. Ili ne traktas tion serioze, sed tegmenton superkape ili tamen volas havi, en lignostako, ŝtonaro, fendo en la muro, ĉio taŭgas. Sed plej ofte estas sub tegolo, kaj volonte sur la sama tegmento jaron post jaro.

Tradukis H.Fr.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20-a en la monato
antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

Bonvolu!

Ni devas ripeti:

Bonvolu zorgi, ke ĉiuj kontribuajtoj al nia gazeto estas klare tajpitaj kaj seneraraj. La kompostisto resendas al ni la manskribitajn manuskriptojn — li ne komprenas nian lingvon, kaj ne povas decidi pri o aŭ a, se la litero estas neklare skribita. Atentu ankaŭ, ke punktoj, komoj, ktp. devas esti ĝustaj. Forigu malĝuste skribitajn literojn.

Ni petas pardonon, ke ni tion ripetis, sed montrigis necese. Bonvolu helpi!

*

KOMUNIKO de la AKADEMIO de ESPERANTO

Sekcio de la Generala Vortaro

La Akademio aprobis la ideon de starigo de «Baza Radikaro Oficiala», kies celo estas aparte proponi la vulgaran aŭ lernolibran vortprovizon, tiel ke laŭeble «la vortaro de la lernolibroj fariĝu tute unueca, kaj ĉiu povu certe scii, kiam vortkonon oni povas supozi ĉe iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro».

Tiu baza Radikaro Oficiala estos ellaborita en la venontaj monatoj surbaze de projekto, kiu entenas proksimume 2 500 radikojn kaj

elementojn, dividitajn en naŭ grupoj de ofteco: de la unua grupo de plej oftaj elementoj ĝis la naŭa kun relative malpli oftaj radikoj kaj elementoj.

La Direktoro de la Sekcio
pri la Generala Vortaro,
Dro A. Albault
La Prezidanto de la Akademio,
G. Waringhien

SCIIGOJ DE N.E.L.

Kunlaboro kun N.E.F.A. N.E.L. kaj Norvega Esperantista Fervojista Asocio decidis kunlabori pri komuna organo. Tio signifas ke de nun N.E.F.A. disponos proks. unu paĝon en ĉiu numero de Norvega Esperantisto, sub aparta redaktoro (Odd Kolbrek). La kunlaboro espereble helpos tiom, ke ni ne plu bezonos redukti kelkajn numerojn ĝis nuraj 8 paĝoj.

La kontorfondaĵo. La nova oficejo estas gravega helpo por nia laboro, sed sen ekonomia subteno de la membroj ni ne povas tenadi ĝin. Dankante al ĉiuj malavaraj helpantoj ni apelacias al ĉiuj, kiuj havas okazon, sendi donacojn, ĉu malgrandajn, ĉu grandajn. Tiel vi helpos firmigi la laboron por Esperanto en Norvegujo.

La Propaganda Fondaĵo. Samtempe ni memorigas ankaŭ pri la tre grava Propaganda Fondaĵo. Ĝi nun atingis tian sumon, ke ĝi komencas fariĝi grava helpo en okazoj de specialaj bezonoj, sed estas evidente ke ju pli granda fariĝos la fondaĵo, des pli utila ĝi estos.

Taskotabelo por la kluboj. — Majo: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La Estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj planas kursojn.

«Vivo de Zamenhof». Kiel oni scias, N.E.L. transprenis la reststokon de la norveglingva eldono de la fama verko de Edmond Privat, kaj ni vendas ĝin por la treege malalta prezo de kr. 3,00. Ĉar la librostoko ligas grandan parton de la malgranda kapitalo de N.E.L., estas grave forvendi la librojn laŭeble rapide, kaj ni rekomendas al la mem-

broj amase aĉeti ĝin. Ĝi aparte taŭgas kiel donaco al homoj, kiujn vi deziras varbi por nia movado.

Raporto de la Liga Estraro pri la 1a jarkvarono. Okazis 2 estrarkunvenoj. Oni elsendis 2 cirkulerojn, el kiuj unu ankaŭ al la rektaj membroj. Oni ellaboris kaj aprobis jarraporton kaj jarkalkulojn 1966. Oni decidis kunlabori kun N.E.F.A. pri Norvega Esperantisto; dank al tio kaj al kolekto da anoncoj el Sauda oni povis decidi provizore ne redukti iujn numerojn; aliflanke, pro la transiro al nova presejo la unuaj numeroj de 1966 grave malfruiĝis. Oni reelektis Ludvig Anjer kiel Komitatanon A de U.E.A. Oni laboris pri planoj pri kongresvojaĝo al Tel Aviv. Oni preparis la 40an landan Kongreson de N.E.L. en Sauda kaj ellaboris proponojn prezentotajn al tiu Kongreso.

La Liga Estraro.



Mi opinias . . . Pensoj de la legantoj

LA PUBLIKAJ BIBLIOTEKOJ KAJ LA ESPERANTA LITERATURO

Nuntempe, funkciante kiel sekretario de Okcidenta Distrikto de NEL, mi havas la okazon rigardi la raportojn de la diversaj kluboj.

Mi konstatis, ke la bibliotekoj en la koncernaj urboj havas malmulte da libroj en Esperanto, kaj mi trovas ke la nombro de esperantaj libroj en tiuj bibliotekoj ne kreskis dum kelkaj jaroj.

Estas necese ke la esperantistoj, la komisiuloj por libroj en la kluboj, aŭ aliaj kompetentaj personoj, vizitu la bibliotekojn kun kelkaj novaperintaj bonkvalitaj libroj, petante la bibliotekiston aĉeti tiujn kiuj plej interesas. Fakte neniam estis malfacile atingi ion en tiu kampo, mi faris tion antaŭ multaj

jaroj en Bergen, kaj nun ni kutimas en Sauda rekomendi kelkajn bonajn librojn por la biblioteko ĉiujare.

Oni sciu ke la publikaj bibliotekoj havas grandajn monsumojn je dispono por aĉetado, kaj se oni montras al ili vere valorajn kaj interesajn librojn, mi estas certa ke ili aĉetos.

Per tio oni atingas almenaŭ du aferojn: Unue propagando por Esperanto ĉe la bibliotekistoj, kaj ĉe la publiko kiu kutime vizitas la bibliotekojn, rigardante kaj serĉante en la bretaro. Due oni apogas la esperantan literaturon, ĉar ĉiu ekzemplero vendita signifas monan kaj moralan subtenon por tiu grava flanko de nia movado.

Fine la esperantistoj montru intereson por la bibliotekaj esperantaj libroj, per diligenta pruntado kaj rekomendado al aliaj gesamideanoj.

Elna Matland.

KIAL NI NE PROGRESAS?

Bedaŭrinda fakto estas, ke la esperantomovado en Norvegujo ne progresas. Ĝi stagnas. Aŭ eĉ regresas. Sed kial?

Mi kredas, ke persona sperto diras sufiĉe klare la kialon. Vi ja ĉiuj scias, ke mi je kristnasko eldonis himnaron en Esperanto. Tio estis novaĵo, kiun kaptis la gazetaro — eĉ la plej grandaj. Kaj el tiuj la televido lernis la novaĵon, kaj ordonis al fotografo vojaĝi ĉi tien por fari filmon. Jen Esperanto trovis sian vojon en la televidon.

Poste — jes, jam en la sama tago telefonis du gratulantoj. Unu esperantisto — bona amiko. Unu neesperantisto. Kaj la postajn du tagojn mi ricevis plurajn gratulojn. Sed ne de pluraj esperantistoj. Kaj mi ricevis mendojn de la libro. Entute 12 + ĝenerala mendo de nia eldonejo. El la 12 mendoj unu venis de esperantisto — de svedo.

Kial ni ne progresas? Al mi la respondo ŝajnas klara. Ĉar ĉiu el ni pensas tiel: Nun oni devas ion fari. Kaj tiel: Bone, ke oni aranĝas kursojn, ke oni eldonas nian revuon, ke ni havas abundan literaturon en nia lingvo.

Ĉar tre, tre malmultaj pensas: Jen mi devas ion fari. Mi devas aranĝi kurson aŭ mendigi leterkursojn, mi devas sendi materialon al nia gazeto, mi devas aĉeti kaj subteni la literaturon.

Car la vorto *oni* estas danĝera, kaj devas esti anstataŭata per *mi*.

Hans Amund Rosbach.



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kallbakkstubben 22,
Oslo 9

La Reloj ligas la Landojn, Esperanto la Popolojn



Kiam la sveda lokomotiv-estro, (maldekstre) transprenas la deĵoron en la rapidtrajno Oslo Ø—Stockholm C de sia norvega kolego, lokomotivestro Ole Stenseth de Oslo, en la landlimstacio Charlottenberg, ilia devo estas interŝanĝi necesajn deĵorajn informaĵojn.

Dank al la simileco inter la lingvoj en la skandinavaj fratlandoj, la interparolado entute ne havas problemojn, kaj ili ankaŭ havas okazon interŝanĝi kelkajn amikajn vortojn, eble pri ŝatokupoj kiel fiŝkaptado, filatelio, muziko aŭ horkantado, kaj fine deziri unu al la alia «daŭran bonan veturadon».

Ĉu fervojistoj en aliaj landlimstacioj en la cetera mondo havas la saman bonan avantaĝon al amika interparolado, kiel ĉe ni en Skandinavio? Aŭ ĉu ili spertis ke la lingvaj baroj vere estas grava malhelpo? Ĉu ne estas dezirinde ke ĉiuj fervojistoj en la tuta mondo lernu la internacian lingvon Esperanto?

ALIĜO AL FISAIC

(FISAIC = Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles des Cheminots — La Internacia Federacio por Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervojistoj)

Kiel trafikinstituto la fervojo jam estas malnova kaj tradiciirica. Dum pli ol 100 jaroj ĝi prizorgas la grandparton de la surtera trafiko en la eŭropa kontinento.

La fervojreto estas vasta, kaj la fervojo laborigas arojn da homoj. Fervojistoj estas profesigrupo kun amplekse evoluita korpusa

spirito, karakterizita per akurateco kaj disciplino.

Generale fervojistoj bone kunlaboras, kaj la ligojn de profesio ili ofte kunportis en la privatan vivon — precipe tiuj, kiuj havas la samajn komunajn ŝatokupojn.

Ili organizis siajn diversajn libertempaspo-

ciojn, kaj dum la jaroj tiuj asocioj fariĝis multaj kaj diversaj.

En antaŭaj tempoj, fervojistoj kutime nur agis en la kadro de la hejmlando kun siaj ŝatokupoj, sed ĉar la teknikaj avantaĝoj mallongigis la distancojn inter la landoj, la ferioj pli longiĝis, kaj la sistemo de senpagaj biletoj fariĝis pli favora, sendube ne estas alia profesigrupo, kiu havas simile bonajn eblecojn al internacia kunagado kiel ni fervojistoj.

Estas tre ĝojige observi, ke la fervoj-administracio en ĉiam pluraj landoj faras tre saĝan politikon rilate al la fervojistoj — kiel flanke de Norvega Ŝtata Fervojo rilate al nia landa fervojistaro — ilia supozo estas, ke se la fervojistoj bone fartas, — ne nur dum la deĵortempo, sed ankaŭ dum la libertempo, ke ili tiam okupas sin per pozitivaj ŝatokupoj, ilia laboro sendube fariĝas pli altkvalita. Tial ili morale, ekonomie kaj praktike apogas la libertempasociojn. Ĉar la libertempasocioj ĉiam fariĝis pluraj, fariĝis necese por ili agadi kune, kaj eksteren montri komunan vizaĝon.

Plej bone ili faras tion en formo de federacio, kiu estas ligilo inter la opaj libertempasocioj, kaj la fervojadministracioj.

Tiu federacio estas FISAIC.

Ĉe ni en Norvegujo, la rilatoj estas nekomplikaj kaj klaraj, ankaŭ en la fervoja medio.

Tial ni ĝis nun ne trovis necese aliĝi al FISAIC.

Sed dum la lastaj jaroj kelkaj libertempasocioj unuope de eksterlande ricevis instigajn petojn, ke ili aliĝu al la federacio, inter alie ni en NEFA plurfoje ricevis tiajn pet-skribaĵojn ke ni sole, sen atendi al la aliaj asocioj, aliĝu.

Intertempe ni trovis, ke estas plej korekte atendi la sintenadon de la aliaj libertempasocioj, kaj la iniciativon de Norvega Ŝtata Fervojo, kaj fine la longe atendataj reagoj venis.

La 2an de marto ĉijare, la jenaj libertempasocioj, reprezentitaj per siaj prezidantoj, invitiĝis al konferenco kun la ŝtatafervoja ĉefo pri bonfartaj aferoj, s.ro Erling Kiil, en lia kontoro:

Norvega Fervojista Kontraŭalkohola Societo per s.ro Guttorm Stien,

Norvega Fervojista Sportista Asocio per s.ro Per Svane,

EMIL ANDREASSEN 80 jara

Pioniro kaj nestoro de la Esperanto-movado ĵus povis celebri sian 80an jaron kaj li ankoraŭ estas «vigla kaj forta». Do li naskiĝis samtempe kun la naskiĝo de Esperanto en 1887. Andreassen ĉiam interesiĝis pri Esperanto, kiun li frude scipovis.

Ni gratulas lin «malgrandan knabon el Tistedal» (kvankam li pli ĝuste estos granda) kaj deziras al li longan kaj belan oĉion.

Norvega Fervojista Muzikista Asocio per s.ro Øivind Andersen,

Norvega Fervojista Kanthorasocio per s.ro Arne Staveli,

Norvega Fervojista Asocio de ŝatokupoj per s.ro Ivar Ødegaard,

Norvega Esperantista Fervojista Asocio per s.ro Per Johan Krogstie.

La ĉefo por bonfartaj aferoj klarigis la aferon, kaj li proponis, ke oni starigu komunan organon por la supre menciitaj asocioj, kie oni povu diskuti komunajn aferojn kaj problemojn.

Tiu komuna organo, aŭ konsilantaro, aliĝas al FISAIC.

Laŭ propono de la ĉefo de bonfartaj aferoj, li mem estu ĝia prezidanto, kaj la supre menciitaj asoci-prezidantoj ĝiaj anoj.

Norvega Ŝtata Fervojo ne intencas detrui la diversajn libertempasociojn, kiuj laŭ la opinio de la ĉefo por bonfartaj aferoj, tre bone laboras. Li esprimis, ke ili daŭre ricevu la moralan, praktikan kaj ekonomian apogon kiel ĝis nun, kaj oni ne deziras dikti ilian agadon.

Li aludis, ke Norvega Ŝtata Fervojo intencas pagi la kotizon por la anoj en la diversaj libertempasocioj, al FISAIC.

Li ankaŭ petis la ĉeestantojn, ke ili klarigu al la anoj, ĉiu en sia asocio, pri lia propono, kaj se la sintenado estos pozitiva, li volas kunvoki al nova kunveno, kie oni donu al la konsilantaro statutojn. En estrarkunveno de NEFA la 29an de marto, montriĝis, ke la sintenado de NEFA estas por la propono, kaj oni decidis por aliĝo al FISAIC. Nun ni nur esperas, ke ankaŭ en la aliaj libertempasocioj regas pozitiva sintenado.

Ni spertis, ke en FISAIC oni ankoraŭ ne trovis la lingvan denominatoron, kaj ni esperas estonte per Esperanto enkonduki nian lingvon en tiun federacion, kiel ĝian internacian lingvon. Per Johan Krogstie.

EGILL HOUEN

La 20an de februaro 1967 emerita staciestro Egill Houen, Trondheim, forpasis. Li naskiĝis en Stavanger la 3an de julio 1897.

Houen esperantistiĝis jam en 1922 pere de kurso de Tharald Dybing. Houen tiam estis telegrafisto ĉe NSB. Poste li dungigis ĉe la vojaĝoficejo de NSB en Trondheim (1925), Voss (1926—38), Trondheim (1939—41) kaj denove en Voss (1945). Poste li fariĝis staciestro en Finneidfjord (1946—54) kaj Røra (1954—60). En ĉiuj lokoj li estis delegito de UEA (IEL), kaj tie, kie estis kluboj, li partoprenis en la klubo vivo. Li estis vicprez. de «La Tagiĝo», Stavanger (1924) kaj Grupo Esperantista de Trondheim (1940). En 1941 li estis prez. de Grupo Esperantista.

Li ankaŭ gvidis plurajn kursojn i.a. en Trondheim (1925), Voss (1938) kaj du kursojn en Mo i Rana (1954). La kurson en Trondheim partoprenis nia konata tradukisto kaj poeto Erling Anker Haugen.

Houen ŝatis vojaĝi, kaj li vizitis multajn esperantokongresojn kaj kunvenojn. En 1949 li i.a. kunfondis la asocion NEFA (Norvega Esperanta Fervojista Asocio) en Oslo. Li cetere restadis unu jaron en Londono kaj unu jaron en Italujo.

En siaj junaj jaroj li ankaŭ estis lerta sportisto kaj futballudisto.

Li estis afabla homo, vera humanisto kaj ĝisosta esperantisto, kiu havis multajn amikojn enlande kaj eksterlande. Ni sincere sentos la mankon de li, kaj li karmemore estos funebrata.

Paco al lia cindro!

L. K. H.

BJARNE SØRSDAL

La 26an de Februaro forpasis Bjarne Sørsdal en Skjåstad apud Drammen. Bjarne Sørsdal estis tre modesta, sed fidela rekta membro de N.E.L. dum jardekoj. Ni deziras pacon al lia memoro.

JULIO BAGHY

La 18-an de marto mortis en Budapeŝto Julio Baghy, 76-jara.

Julio Baghy estis persono, kiun oni devis ŝati, ĉu oni lin renkontis nur kiel verkistopoeeton, ĉu oni konis lin persone. Kiel homo li estis tre afabla kaj tre modesta — kaj li estis ege populara, kion oni rimarkis je liaj aferoj ĉe la postmilitaj Universalaj Kongresoj.

Baghy naskiĝis 1891, kaj kiel profesion li elektis tiun de aktoro. Partoprenante la grandan militon, li fariĝis kapitulo de la rusoj, kaj post la milito li priskribis la vivon de militkaptito en siaj romanoj «Viktimoj». «Sur sanga tero», «La verda koro».

Kune kun Schwarz kaj Kalocsay li fondis en 1922 la grandan literaturan revuon «Literatura Mondo». Ni ankaŭ menciis, ke Baghy estis tiu, kiu proponis la 15-an de decembro kiel Tagon de la libro. El liaj libroj ni menciis «Songe sub pomarbo» kaj la ĵus aperintan «Cielarko», ambaŭ ŝajne verkoj de juna homo.

800 personoj akompanis la ĉerkon de Baghy al la tombo en Buda la 25-an de marto, kaj la enterigon prizorgis Hungara Esperanto-Asocio.

Johan Hammond Rosbach.

JOHAN FALKBERGET

Ankaŭ la norvega literaturo ĵus perdis sian plej grandan verkiston nuntempan. La 5-an de aprilo mortis Johan Falkberget, doktoro pri filozofio de la Stockholma Universitato, en la alta aĝo de preskaŭ 88 jaroj.

Nebezone ĉi tie menciis la signifon de Falkberget por la norvega literaturo. Bedaŭrinde li estas ankoraŭ malmulte konata en la Esperanta literaturo, ĉar liaj verkaĵoj estas nur fragmente tradukitaj. Kiel honoron ni prezentas en ĉi tiu numero tute freŝan tradukon de novelo lia.

Sed ĉiu esperantisto sciu, ke Falkberget

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23.—30. de julio en La internacia Altlernerjo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Abybøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la alternejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.—21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

Johan Falkberget:

La Najloj - aŭ la fero el la nordo

Ĉe la limoj de Sion la forĝisto Ela havis sian budon, kie li forĝis ĉenojn kaj najlojn. Li estis al la gento de Tubalkain . . . sed nun la gento de Tubalkain malprosperis, kaj Ela fariĝis ŝtelisto kaj krudforĝisto ekster la muroj de Salomo. Ela ankoraŭ estis viro en la plej forta aĝo, sed vino kaj diboĉoj inter la ĉiesulinoj kaj sentaŭguloj de Jerusalemo troaĝigis lin. Lia hararo grizigis. Liaj okuloj estis ruĝaj kaj ŝvelintaj. La vizaĝo plenis de vundoj kaj cikatroj. En sia junao Ela aspiris fariĝi glavoforĝisto en Jerusalemo. Kaj li sin enskribigis lernanto ĉe la granda majstro Zerat. Sed li ne taŭgis. Li ne povis lerni la malfacilan arton. Lia majstro ja baldaŭ komprenigis tion al li . . . sed ĉar li estis el la gento de Tubalkain kaj devenis de grandaj kaj famaj majstroj de la fako, Zerat lasis lin resti. En la silentaj noktaj horoj Ela ŝteliris en la forĝejan sanktejon kie la glavoj ricevis sian ornamadon kaj sian konsekron, li genuis ĉe la mortanta fajro kaj preĝis al Jehovo pri kapablo . . . sed Jehovo ne aŭskultis al lia preĝo.

Tiam Ela en doloro kaj kolero rompintis siajn ferojn. Kaj tiel li fine alvenis al la ekstero de la urbo kune kun la plej aĝaj uloj de la urbo. Por teni la vivon li konstruis sunŝirmilon kaj fajrejon proksime ĉe la malnova bruloferejo.

Li kaj lia ventumisto trairis la urbon nokte por ŝteli la necesajn karbon kaj feron.

Kaj Ela forĝis la ĉenojn al la sklavoj kaj

montris tre grandan intereson pri Esperanto. Li ofte diris al mi, ke li ja estis jam tro maljuna, kiam li informiĝis pri Esperanto, do li ne povis havi esperon pri scipovo de la Internacia Lingvo, sed li deziris morale apogi nian movadon, kaj ni rajtis uzi lian nomon por tiaj celoj. Li donis permeson por tradukado de ĉiuj liaj verkoj, je malgranda kondiĉo.

Dum mia lasta vizito ĉe li, li montris al mi la Esperantan flagon, kiun donacis al li Klubo Esperantista en Oslo. «Oni donacis al mi tiom da objektoj, ke ne ĉiuj povas stari en la salono, sed ĉi tiu flago ĉiam staros videbla,» li diris.

Johan Hammond Rosbach.

najlojn al la krimuloj mortontaj sur la kruco . . . laboro bone salaranta, ĉar la forĝistoj en Jerusalemo rifuzis fari tian laboron. Kaj ja ankaŭ okazis, ke samlandano el Kedron venis al la forĝejo de Ela kun sia azeno kaj vinujo por babili kaj porti iron al riparo.

Sed en unu mateno kiam Ela vekigis de sia ebriego, lia dekstra brako estis paralizita. Li vane provis preni sian martelon . . . la brako estis morta, ĝi pendis malvarma kaj velkinta de la ŝultro. Ĉu Jehovo denove atakis lin? Li piedfrapis la ventumiston, kiu ankaŭ dormis sub la ŝirmilo. Vekiĝu, sklavo! Ela vokis. La ventumisto sin klinis al la kubuto, forfrotis la dormon el siaj okuloj kaj rigardetis al la suno. Kion vi volas, majstro?

Mia brako estas paralizita. Levu ĝin! Mi volas ĝin malbeni! Vi devas nenion malbeni, majstro Ela. Ĉu vi ne timas antaŭ Jehovo? Leviĝu, sklavo! Leviĝu, aŭ mi mortigos vin! Nun la ventumisto ne plu kuraĝis rifuzi, sed levis la brakon de la majstro. Kaj majstro Ela vokis kaj blasfemis kaj malbenis sian malvivan kaj neutilan brakon: Malbenita vi, ek de vi kuŝis en la ventro de mia patrino. Sepfoje malbenita, je Jehovo!

Pala pro timo la ventumisto lasis la velkintan brakon fali. La kolero de Jehovo estis vokita, Jehovo de Sinaj. Li ŝancelis kaj kovris sian vizaĝon. Jehovo, kompatu nin! li preĝis kaj genuis ĉe la fajrejo. Ho, via kolero ne neniigu nin . . .

Post tiu tago Ela vivis en plej granda mizero. Eĉ ĉiesulinoj kaj fiuloj el plej aĝa kvalito ne volis kontakti la paralizitan majstron Ela, kiu ja eĉ ne povis havigi kruĉon da acida vino. En la forĝejo li devis preni la lokon de la ventumisto kaj obei lin. Kaj ĉiufoje kiam la ventumisto volis forĝi, li malsukcesis. Kaj je neniu utilo Ela montris per la maldekstra brako al la ruĝaj feroj kaj blasfemis kaj riproĉadis. Stultulo! Ela furiozis. Vi nur foruzas miajn ferojn!

Kaj la unubraka majstro kaj la malobeema ventumisto interbatalis kaj vivis sendian vivon sub la sunŝirmilo. La interbatalo finiĝis kiam la ventumisto forĵetis la martelon kaj la prenilojn kaj forkuris. Kaj jen staris majstro Ela kaj povis nenion fari.

La duonan tagon li sidis kun la dorso al la formortinta forĝeja fajro kaj rigardadis en

la sunbrilon. Lia acideco kreskis. Li blasfemis la sunon, teron, ĉion. Lia animo pleniĝis de galo. Se li povus uzi ambaŭ manojn, li mortigus sin mem. Nur la postan matenon la ventumisto revenis. Majstro Ela tiam kole-regis kaj lin akceptis per blasfemoj kaj insultoj . . . sed kiam Ela finis versi siajn blasfemojn super la kapon de la ventumisto, tiu komencis rakonti pri stranga viro, kiu dum tiuj ĉi tagoj faris miraklon post miraklo. Estas ĉarpentisto el Nazareo. Jes, oni eĉ rakontis en Jerusalemo pri vekigoj, el la morto.

Vi iru la la urbo kaj serĉu lin, diris la ventumisto. Li kuracas ĉiujn malsanulojn kiuj venas al li, lamuloj marŝas, blinduloj ricevas vidpovon, kaj lepruloj estas purigitaj. Li sin nomas filo de Dio.

Filo de Dio? ehis Ela. Do stultulo. Ne, lin mi ne serĉos. Mi ankaŭ pli frue aŭdis pri li. Li estas trompisto.

La ventumisto ŝajnis ne aŭdi la vortojn de Ela kaj daŭre rakontis: Li kaj kelkaj ŝtelistoj hodiaŭ sidis en la ombro de muro ĉe Gibon kaj malsoifigis sin per kruĉoj da bona vino, kiujn ili ŝtelis de samlandano frue en la mateno antaŭ la sunapero. Tiam unu vokis, ke la ĉiesulino Iria venas. Tiuj, kiuj ankoraŭ estis sufiĉe sobraj por ekstarti, prenis ŝtonojn kaj minacis al la pestulino. Sed Iria vokis al ili kaj mansignis, ke ili ne plu timu ŝin, ĉar ŝi nun estas pura. Ĉiuj vundoj kuraĝigis. Miraklo okazis. Ili unue kredis tion mensogo, kaj ŝi devis stari fore por rakonti.

Rigardu, ŝi vokis kaj antaŭenmetis la manojn. Ĉu ne senvundaj? Kaj mia vizaĝo estas kia ĝi estis antaŭ mia peko al Dio. Kaj je ilia miro ili vidis, ke ŝiaj manoj kaj vizaĝo estas senvundaj. Ŝi ĵus estis ĉe la pastroj, kaj ili atestis ŝian purecon, sed kiam ŝi rakontis, ke la majstro el Nazareo ŝin kura-cis, ili malpermesis al ŝi preparoli tion al iu ajn.

Jen, vidu, interrompis majstro Ela. Ankaŭ la pastroj nomas lin trompanto. Ĉu mi ne pravas?

La ventumisto nur ridetis kaj daŭrigis. Iria diris: La filo de Dio redonis min al la suno kaj la homoj.

Ĉu vere? diris Ela. Li ekaŭskultis nun. Kaj kiel tio okazis? Jes, diris la ventumisto. Estis hieraŭ. Iria sidis en sia terokaverno apud la vojo al Damasko kaj vokis al la vojirantoj pri almozoj, kiam tri viroj preterpasis. Unu estis pli bele vestita ol la du, kaj ŝi komprenis, ke estas sinjoro kun du ser-

vantoj. Lia mantelo estis multvalora . . . sed strange, nek li nek la servantoj havis armilojn.

Li estis belega. Neniom ŝi vidis similan viron. Li haltis kaj rigardis ŝin. Kiu vi estas, li demandis. Foriru, sinjoro, ŝi respondis. Mi estas malpura. Iria, leviĝu, li diris. Viaj pekoj estas pardonitaj. Kaj en la sama momento estis kvazaŭ giganta lumo penetras tra ŝi. Ŝi rigardis al siaj manoj, ili estis kura-citaj kaj senvundaj. Ŝi frotis sian vizaĝon, ankaŭ ĝi estis sen vundoj. Kaj tiam ŝi komprenis, ke li estas Jesuo el Nazareo. Antaŭ ol ŝi povis genui por danki, li kaj liaj servantoj jam estis ĉe la Damasko-pordego. Ŝi kure sekvis, tretis sur sian ĉifonan jupon, stumblis kaj reekstaris, sed ŝi ne atingis ilin. Tra la pordego ŝi ne kuraĝis iri antaŭ ol ricevi permeson de la pastroj. Kaj la tutan tagon hodiaŭ ŝi serĉis Jesuon, sed ne trovis lin. Ĉu vi vidis lin, ŝi demandis, dum ŝi fingrumis kelkajn polvoplenajn dornopozojn, kiujn ŝi kolektis. Tiujn ŝi volis meti ĉe liaj piedoj. Neniom alian ŝi posedis, nek ŝmiraj-on, nek oleon . . .

Mi ne kredas je tiaj mirakloj, diris majstro Ela kaj denove malpacientiĝis. Certe estis en la Oriento kelkaj magiistoj, kiuj legis signojn kaj faris strangajn agojn, sed tion ĉi . . .

Sed Johano? diris la ventumisto, kolera je la malkredo de la majstro. Ĉu ne ankaŭ li faris miraklojn? Kiu Johano? Johano, la baptisto. Majstro Ela aĉe ridis. Li ja mortis malindan morton. Ankaŭ li estis trompanto. Certe tiel okazos ankaŭ al la Diofilo. Nur atendu. Sed tio ne koncernas min. Faru fajron, sklavo! Mi devas forĝi naŭ ĉenojn kaj tri koloferojn. Li rigardaĉis sian velkintan brakon. Ho, kiu povus ĝin forhaki kaj entombigi. Li ne plu volas ĝin porti.

La ventumisto rapidis al alia forĝisto por pruntepreni fajron. La feroj estis enmetitaj, sed la provo forĝi estis vana. Neniom helpis la blasfemado kaj insultado kaj mon-trado de Ela, la ventumisto nur malpli komprenis. Kaj fine li denove forĵetis la martelon kaj la tenilon kaj forkuris.

Denove majstro Ela staris sola kaj senhelpa. La fajro estingiĝis, la ardo en la fero malaperis, la malsato mordis la intestojn, kaj la soifo gluigis la langon al la buŝo. Li restis sidanta sur la amboso kaj rigardis kun malplena okulo al nenio.

Se li serĉus tiun majstron el Nazareo? Ne ke li fidus eĉ iom, ke tio helpus. Li moke pensis pri la tuto. Iria tute ne puriĝis.

Estas mensogo. Jes, mensogo. Oni ne povas fidi, kion drinkemuloj kaj sentaŭguloj rakontadas. Kaj lia nekombita kapo falis al la brusto. Nun li devas sin mortigi. Li ja povas grimpi sur la muregon apud la Damaskopordego kaj sin ĵeti eksteren. Kiam la gardisto dormos, li devas tion fari. Li ja havas nenion allogan en la vivo. Ĉiuj revoj jam delonge mortis. Nun li ne plu povas gajni eĉ la sekan panon. Aĉulo al Dio kaj homoj. Kiom utilas, ke li devenas el la gento de Tubalkain!

Sed kiam la suno denove levigis, majstro Ela ankoraŭ vivis. Anstataŭ sin ĵeti mal-supren de la murego ĉe la Damaskopordego li nun vagis tra Jerusalemo kaj serĉis Jesuon el Nazareo. Li volis almenaŭ paroli kun li. Aŭdi kion li opinias pri tiu velkinta brako . . . aŭdi, ĉu ĝi iam povos pliboniĝi.

Ela pli kaj pli entuziasmiĝis. Li serĉis kaj ĉie demandis pri Jesuo el Nazareo. En la noktloĝejoj kaj la domoj li prizemandis lin. Iuj ĵus estis lin vidintaj. Li do estas en la urbo. Kaj Ela ekesperis. Li ankaŭ renkontis aliajn, kiuj lin serĉadis. Kelkaj portis mal-sanajn infanojn. Kelkaj portis kriplulojn kaj lamulojn sur portiloj, kaj inter ili pluraj riĉuloj kaj nobluloj. La tago pasis, sed Ela ne sukcesis trovi Jesuon. Kaj la malsato kaj soifo preskaŭ devigis lin genui. Pli kaj pli ofte li devis halti kaj sin apogi al muro por ne fali. La suno jam estis malaperanta, jam staris malalte super Hinno. Kaj la nokto alvenas.

Sed kio? Juna viro en riĉa mantelo frotis en la homamaso laŭ la velkinta brako. Ela suprenrigardis. La tristaj okuloj kaj belaj trajtoj de la junulo estis al Ela abomenaj . . . kvazaŭ lia propra malbeleco vokus al la senmakuleco de tiu viro, Jehovo estas nejusta. Al unu li malavaras . . . alia devas esti kripla kaj malbeleca. Ĉu tio estas justeco?

Ela, iru al via forĝejo kaj plenumu vian taskon, la juna viro diris al li. Nun la brako estas sana, sed neniam plu malbenu ĝin.

Mi ne povas labori, kiu havas nur unu brakon? murmuris Ela. Kaj nevole li levis sian dekstran brakon alte. Kaj nur nun li sentis, ke la mortinta brako ricevis novan vivon. Li rigardis ĝin konsternite. Kaj jen li komprenas, ke li staras vid-al-vide kun la ĉarpentisto, kiu nomis sin filo de Dio. Kaj li ankoraŭ malŝatis lin, kvankam Jesuo faris al li tiom grandan bonagon. Li sentis, kvazaŭ ili ambaŭ venis, ĉiu el sia mondo.

La Majstro el Nazareo nur rigardis sen diri ion. Kaj jen tio mirigis Elan. Kion li opinias?

La postan matenon Ela estis en sia forĝejo. Li kondukis la martelon kun plena forto. Ĉiutage majstro Ela pensis: Morgaŭ mi iros al la urbo por serĉi Jesuon el Nazareo por danki lin pro lia granda beno al mi, tio estas mia plej malgranda devo. Sed la posta tago ĉiam alportis malhelpon. Estis tiom da ĉenoj, kolferoj kaj kruconajloj por forĝi, ke neniam estis tempo iri al Jerusalemo por serĉi Jesuon.

Fine li preskaŭ ne plu memoris tion. Kaj la forĝisto pli kaj pli reiris al sia pli frua diboĉa vivo. Nun denove li lasis la ventumiston travagi la urbon por ŝteli feron kaj karbojn, dum li mem drinkis kune la ĉiesulinioj kaj sentaŭgulaĉoj ĉe la urbolimo. Jes, eĉ okazis, ke li malbenis tiun manon, kiu ne povis ion ajn krom la krudan laboron forĝi ĉenojn kaj kolferojn.

Du jarojn poste Ela staris sub la sunŝirmilo kaj forĝis longajn najlojn por krucumo. Nun li tute forĝis Jesuon. Hodiaŭ la fero ne volis ruĝiĝi. Ela blasfemigis, dum li turnis la feron en la fajro. Kaj la ventumisto tretis la ventumilon tiel, ke la ŝvito fluus laŭ la malpura vizaĝo. De kie vi ŝtelis tiun feron? demandis Ela. De muro en la templo de Salomo, diris la ventumisto dum li elĉerpita ripozis. De la templo de Salomo? rediris majstro Ela pensante. Jen ĝi venis el la Nordo . . . el la montoj kun eterna glacio kaj neĝo. Ne strange, ke ĝi tiel plenas je malvarmo, ke ni ne sukcesas igi ĝin ruĝa. Kaj Ela turnis la feron, turnis ĝin en la fajro . . . kaj la ventumisto tretis la ventumilon, ke fumo kaj fajro sin verŝis al la sunŝirmilo. Kaj iom post iom ili povis igi la feron sufiĉe varma, ke majstro Ela el ĝi sukcesis fari tri longajn najlojn. Elĉerpita la martelis sian simbolon sur ili kaj sidigis peze spiranta sur la amboso. Li certe ne plu volis forĝi feron el la templo de Salomo. La frostoj kaj malmolo de la tuta mondo estas en ĝi.

*

En la posta pasko oni krucumis Jesuon el Nazareo. Kaj strangaj mirakloj okazis dum li mortis: Tertremo, la suno malaperis, kaj la mortintoj relevigis. Ĉu li tamen estis filo de Dio?

En la unua tago post la pasko, amaso da homoj iris al Golgota. La krucoj de Jesuo kaj de la du rabistoj ankoraŭ staris . . . Inter

På norsk

ESPERANTODIKTEREN JULIO BAGHY ER DØD

Esperantolitteraturens mest kjente forfatter og dikter, ungarenen Julio Baghy, er død, 76 år gammel. Sammen med sin landsmann Kalmán Kalocsay hører han til dem som har bidradd mest til at Esperanto har en original litteratur av varig verdi. Selv skrev og talte han Esperanto fra han var 20 år. Julio Baghys dikt, romaner og noveller, som til dels også kom ut i oversettelser til andre språk, skaffet ham stor popularitet blant esperantister i alle land. I mellomkrigstiden ledet han kurser i det internasjonale språket og skrev lærebøker i Esperanto for ungarene.

la multaj miloj kiuj aliris, estis la forĝisto Ela. Li unue restis je distanco kaj ombrumis per la mano, dum li rigardis la krucojn.

La soldatoj ĉiam denove uzis siajn lancojn por disigi la homoamason. Li ekvidis junan virinon, kiu fojon post fojo estis forpelita, sed ĉiam denove revenis por genui ĉe la kruco de Jesuo, brakumi ĝin kaj kisi ĝin. Fine oni prenis ŝin kaj forkondukis ŝin. Kaj Ela reekkonis ŝin: estis Iria.

Post momentoj ankaŭ Ela staris ĉe la krucoj. Jen li ekgardis la tri najlojn, per kiuj Jesuo estis najlita al la kruco. Ili kuŝis inter la ŝtonoj.

Kiel malnova forĝisto li volis scii, kiu forĝis ilin, kaj li prenis najlon por rigardi ĝin. Lia vizaĝo fariĝis cindre griza . . . Li fikse rigardis la sangomakulitan najlon en sia granda, kruda mano: Li mem forĝis ĝin. Estis unu el la najloj forĝitaj el la fero, kiun lia ventumisto ŝtelis el la templomuro de Salomo . . . la fero el la Nordo . . . Kaj li forĝis la najlojn per la mano, kiun Jesuo kuracis. Nun li komprenis al kio la ĉarpentista filo aludis, dirante: Iru al via forĝejo kaj plenumu vian taskon.

Li estis . . . jes, certe li estis filo de Dio, singultis Ela.

Kaj li foriris ŝancelante.

Trad.: Hans Amund Rosbach.

Under Esperantokongressen i Budapest i fjor, hvor endel av rekordtilstrømmingen sikkert skyldtes forventningen om å få se og høre dikteren, fikk han stormende hyllest fra kongressdeltakerne på de møter hvor han var til stede. Hans siste diktsamling «Cielarko» (Regnbuen) ble utgitt noen uker før han døde.

50 ÅR SIDEN SKAPEREN AV ESPERANTO DØDE

14. april 1917 døde Ludoviko Lazaro Zamenhof, den polske jødiske legen som for 80 år siden offentliggjorde sitt internasjonale språk Esperanto. Zamenhof døde på et tidspunkt da den første verdenskrig truet med å ødelegge resultatene av hans arbeid for et felles språk for internasjonal kontakt.

Siden har arbeidet for Esperanto overvunnet følgene av to verdenskriger og Esperanto har i dag større tilslutning verden over enn noen gang tidligere. I over 80 land er det mennesker som taler det internasjonale språket og som er knyttet sammen i et nett av landsforbund og internasjonale organisasjoner, hvor Universala Esperanto Asocio med hovedsete i Rotterdam danner kjernen.

ISRAELSK FRIMERKE MED TEKST PÅ ESPERANTO

I anledning av den 52. Verdenskongress for Esperanto i Tel Aviv i august skal postverket i Israel utgi et spesielt minnefrimerke. Det blir det niende land som får frimerke med tekst på det internasjonale språket. De land som tidligere har gitt ut slike merker, er Brasil, Bulgaria, Ungarn, Jugoslavia, Polen, Sovjetsamveldet, Tsjekkoslovakia og Østerrike.

ESPERANTO VED UNIVERSITETET I MOSKVA

Ved universitetet i Moskva er det nå med offisiell tillatelse fra universitetets ledelse opprettet en Esperantoforening. Det meldte seg straks omkring 100 deltakere til foreningens første kurs i Esperanto. Universitetsledelsens avgjørelse er ett av mange eksempler på mildere klima for Esperanto i Sovjetsamveldet, hvor det i mange år har vært forbudt å benytte det internasjonale språket.

52-a Universala Kongreso de Esperanto Tel Aviv, 2-9 Augusto 1967

Simbola Aliĝo. Por personoj, kiuj ne povas entrepreni la vojaĝon al Israelo, sed tamen deziras iamaniere esti ligitaj al la Universala Kongreso, estas starigita speciala «Simbola Aliĝo.» Kontraŭ pago de aliĝkotizo de 25.— ned. guld. (100.— steloj) la aliĝintoj ricevos specialan kongresan karton kaj la Kongresan Libron.

Inaŭguro. L. K. K. kaj la Estraro de U.E.A. akceptis la inviton de la Urbeŝtaro de Jerusalemo okazigi la Oficialan Inaŭguron en tiu urbo. Detaloj aperos en la Kongresa Libro.

Diservoj. Evangelia kaj katolika diservoj estas planataj okaze de la tuttagaj ekskursoj al Nazareto kaj Jerusalemo, diamanĉon la 6-an de aŭg.

Loĝado. Post la 1-a de majo la Loĝiga Servo de la Kongreso ne plu povas plenumi

mendojn. Kiu ne rezervis por si hotelĉambron antaŭ tiu dato, devas tion prizorgi pere de vojaĝoficejo en sia lando.

Artaj Aranĝoj. En la kadro de la kongresa programo okazos i.a. teatra prezentado, fare de IAT, literatura recitalo, fare de la konata aktoro Nikolaj Rytjkov kaj prezentado de israelaj folkloraj dancoj.

Statistiko (je 11/4 -67). Arg. 4, Aŭs.lio 6, Aŭst. 14, Belg. 16, Braz. 2, Brit. 45, Bulg. 30, Ĉeh. 19, Danl. 26, Finnl. 3, Franc. 118, Germ. 20, Grek. 3, Hisp. 13, Hongkongo 1, Hung. 40, Isr. 116, Ital. 39, Jap. 8, Jug. 31, Kan. 7, Mon. 5, Ned. 34, Norv. 8, Nov-Zel. 2, Poll. 103, Port. 2, Rum. 2, Sov. 4, Sved. 41, Svis. 13, Usono 27, Venez. 1, Entute 803 el 33 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

JARKUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo.

Dum klubkunveno 2/3. 67 okazis ĝenerala kunsido, kaj la elektoj rezultis jene:

Prezidanto: John Berggreen (reel.)
Vicprezidanto: Thor Magnus Carlsen (nova)
Skr. korespondanta: Aslaug Refsing (reel.)
Skr. raportanta: Harda Danielsen (reel.)
Kasisto: Chr. Mortensen (reel.)
Studgvidanto: John Berggreen (reel.)
Propagandestro: T. M. Carlsen (reel.)
Estraranoj: Brynhild Østmo (reel.) — Aase Gustavsen (nova)
Anstataŭantoj: Birgit Normann (nova) — Kirsten Ek (reel.)

Raportis Harda Danielsen.

Mara Vento jarkunvenis 2/2. Post bonvenigaj vortoj de la prez. kaj malferma kanto, la programulo de l' vespero s-ano *Arne Alne* prezentis tre interesan kaj instruan kolorlumbildan programon. Li per tre belaj kaj trafaj bildoj kaj akompanaj vort-klarigoj

kunirigis nin al plaĉaj, pentrindaj lokoj en landoj fremdaj. Jen ni estis bildvizite en fama Pompej, jen en Sardinia, Cypros, sunaj Sorento, Alexandria kaj Pireus. Alternis vico da diverslandaj urboj kaj pejzaĝoj kaj la vojaĝo kondukis nin ankaŭ al la Parizo de l' Oriento — Beirut. Kun Alne kiel lerta vojaĝ-gvidanto ni rigardis diversajn fremdajn havenojn kaj li konigis al ni ankaŭ vidaĵetojn el la vivo surŝipe. La plaĉan programon la ĉeestantoj danke aplaudis.

Post la lumbild-programo ni transiris al la jarkunvena tagordo. La jar-raporton legis la sekr. kaj la jar-bilancon la kasisto. Ambaŭ senrimarkige aprobis. La raporto montris jaron kun bona aktiveco diversflanka.

La elektoj rezultis jene: Nova prez. post O. Thormodsens kiu petis liberigon post funkcio dum jar-vico, fariĝis Johs. Sortland. Kiel viceprez. reelektiĝis Klara Dahl. Nova sekretario post Sortland fariĝis O. J. Rønnevig kaj nova kasistino post Kjetland kiu petis liberigon, s-ino Lovise Sortland. O. Thormodsens iĝis estrarano. Anstataŭantoj: Solveig Mathiesen kaj Signe Lise Stava. Revizoroj: Erling Vorland, Sigm. Blikshavn.

Studgvidantino fariĝis Judith Johansen.

Raportis O. Thormodsens.

Kristiansands Esperantoklubb.

23/2. La elektitaj komitatataj membroj estas: Prezidanto Birger Reinertsen, vicprezidanto Helge Grøntoft, sekretario Johan Westerlund, kasisto Jakob Lønne, komitatmembro Magne Stiansen.

Raportis Johan Westerlund.

ASCENDO havis jarkunvenon.

kiu okazis ĉe s-ro Arnt Dahl. Post refero de la protokolo kaj jarbilanco, oni transiris al la elektado, kiu donis jenan rezulton:

Henry Fridén, prez. (ree.), Arnt Dahl (vpr., sekr.), Fridtjof Lettenstrøm (kasisto), Borghild Fridén (estrarano) (nova), Kolbjørn Braavig (supl.), Kaj Håkon Gunnæs (revizoro).

La prezidanto sciigis, ke estos ebleco por la gazeta kurso en Halden Arbeiderblad. Le kontaktos la redaktoron pri konvena tempo.

H. Fridén.

Grupo Esperantista en Trondheim

31/1 okazis la jarkunveno. En la jar-raporto estas menciita, ke dum la jaro, inter la jarkunveno en 1966 kaj la jarkunveno en 1967, okazis entute 18 diversaj kunvenoj de la Grupo; inter tiuj 15 estis ordinara kunvenoj, unu eksterordinara kunveno, unu ekskurso kaj unu festo. La plej multajn kunvenojn ni okazigis en hejmoj de membroj kiuj havas sufiĉan spacon por tio. La jarkalkulo bilancis per la sumo 1 569,98. Oni diskutis ankaŭ la eblon de kursarango dum la venonta aŭtuno. Jena estraro estis elektita: Lars Kåre Hunnes, prezidanto, Erling P. Næss, vicprezidanto, David Termén, sekretario, Kristian Fleischer, kasisto, Else-Margrethe Müller, studgvidanto, Leif Berg, Esther Myhre, anstataŭantoj.

Sanda Esperantoklubb havis sian jarkunvenon 2/2. en Sparebanklokalet. La jar-raporto montris ke la klubo vikle kaj konstante laboris dum la pasinta jaro. Du eksterlandanoj vizitis la klubon, kaj oni utiligis iliajn vizitojn ankaŭ en la propagando por Esperanto.

7 el la membroj partoprenis la kongreson en Budapeŝto, kaj preskaŭ ĉiuj la distriktan kunvenon en Hogganvik pentekoste. La estraro de la klubo konsistas nun el jenaj personoj: Johan Matland, prez. Olav Ander-

sen vicprez. Elna Matland sekr., Eldrid Andersen kas., Arthur Bjerke ano. Leif Berg supl. Ida Veka kaj Aagot Bjerke revizoroj. Repr. por la gazetaro estas Norman Birkeli, kiu funkcias ankaŭ kiel radiorepr.

«*La Norda Stelo*», Hamar.

Jarkunveno okazis en la hejmo de s-ro J. A. Kleven 14/2. La elektoj donis la jenan rezulton:

Prezidanto s-ino Lise Koller
Vicprez. s-ro J. A. Kleven
Kas. f-ino Else Stang
Skr. f-ino Ragna Johannesen
Membro. s-ro E. K. Ruud
Anstataŭantoj: s-ro P. Myklevoll
s-ino Aslaug Diesen-Holl
Deligito: s-ro J. A. Kleven.

Post la elektado s-ro Kleven rakontis pri sia vojaĝo al Usono, kiu li inter alie partoprenis Zamenhofan feston en Washington.

Raportis Ragna Johannesen.

ORDINARAJ KUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo

20/3. 67. La prez. John Berggreen deziris koran bonvenon al la ĉeestantoj kaj precipe al nia prelegonto Itamar Even-Zohar el Israelo, kiu rakontis pri «Israelo de hodiaŭ». Li klarigis pri la geografia situacio de Israelo, pri la klimato, la historio, la problemo de la lingvo, la evoluo de la Israela ŝtato, la Esperanto-movado, kaj multo alia. La prelego estis ege interesa kaj la ĉeestantoj montris sian kontenton per forta aplaŭdo. Otto Prytz per sonbendo ludis israelan muzikon.

Raportis Harda Danielsen.

Mara Vento kunvenis 2/3. Prezidis la nova prezidanto Johs. Sortland kiu salutis per bonvenigaj vortoj. Sekvis malferma kanto kaj referaĵo pri la jarkunveno.

Tre interesan kaj instruan programon prezentis s-ano Liv *Vik* montrante belkolorajn lumbildojn el diversaj partoj de la mondo. Bilde-vorte ŝi kondukis nin al karakterizaj partoj de Norda Norveglando, i. a. al sia hejmo loko Kabelvåg.

El Norvegujo ni transsaltis al la kolor-

simfonio de nederlandaj tulip-kampoj kaj al la liliputa urbo Madurodam. La prezento ampleksis ankaŭ tre interesajn bildvidaĵojn el Aŭstralio kaj Japanujo — i. a. el Hiroshima. La programulinon la ĉestantoj dankis per kora aplaŭdo.

Ref. O. J. Rønnevig.

La Esperantoklubo de Bergen kunvenis 11/3 en la agrabla hejmo de s.ino Annemor Jæger Bye.

Komercantoj havis la taskon prizorgi la programon, kaj tiun ili vigle plenumis.

Ili prezentis etajn komediojn, kantis kvar-tete, kaj sole, kaj laŭlegis — Ĉio tre lerte.

Ili kaj ilia instruistino s.ino Doris Birke-lund meritas honoron.

La kunveno estis kiel spirito de la viglaj kunvenoj en pasintaj jaroj.

Johs Jahren.

Grupo Esperantista en Trondheim kunvenis 17/1. La prezidanto, Lars Kåre Hunnes, faris tre interesan paroladon pri la unuaj jaroj de Esperanto en Trondheim kaj pri la fondo de nia klubo en 1907. Grupo Esperantista ĉi-jare estos 60-jara la 3/9. Li menciis ankaŭ la interesan polemikon en la bontemplana gazeto «Heimkjær», Trondheim, inter persono nomata A. C. kaj Johan Løvli en 1906—07.

Dum la kunveno 14/2 oni decidis denove havi la kunvenojn en hejmoj de membroj. La prezidanto daŭrigis sian historion de la Grupo Esperantista. Li menciis la Ido-polemikojn inter J. D. Landmark kaj Ragnv. Rian en 1911—12 kaj inter Landmark kaj Arnesen en 1922—23. S-ro Søren Engesgaard Christie restaŭrigis la grupon dum sia tempo kiel lektoro en Katedralskolen en Trondheim. Fine la parolanto prezentis la helplingvon OFAT de Olav Farstad, kaj sekvis viva konversacio pri ĉi tiu interesa persono.

La kunveno 28/2 okazis en la hejmo de gesinjoroj Karterud. Faris la prezidanto paroladon pri la memoro de la multjara membro de la grupo, s-ro Egill Houen. Dum la lingva kvaronhoro ni tradukis parton de la fabelo de la tri Kaproj Bruse. S-ro Karterud rakontis pri la sveda muzikkritikisto kaj komponisto Wilhelm Peterson-Berger okaze de la centjara naskiĝtago la 27an de februaro. Li ankaŭ demonstris lian muzikon per piano kaj per sonbendo kaj gramofona disko.

14/3. Ni estis en la hejmo de gesinjoroj Nordstrand, kie ni dum la lingva kvaronhoro provis solvi krucvorton de s-ro Nils Utne. Poste s-ro R. Andersen montris la belegan kolor- kaj sonfilmon «Renkonto kun Fiat».

La grupo en Trondheim estas malgranda sed vigla, plena de fido al la estonteco.

David Termén.

Klubo Esperantista en Oslo.

16/1. 67. La prez. John Berggren deziris bonvenon al la kunveno — kaj bonan novan jaron.

Brynhild Østmo rakontis pri «Kiel mi fariĝis esperantisto». Tre amuze kaj humore ŝi rakontis pri la «rabistlingvo» uzita kiam ŝi estis infano, la renkonto kun la nomo Esperanto en anonco, kaj en ekspozicikesto en Hamar. Per amikino kiu estis esperantistino vekigis ŝia intereso por la internacia lingvo. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj kaj kontraŭaĵoj ŝi aliĝis al esperantokurso en S.F.U. Dum la kurso ŝi kiel taskon skribis «romanon» tiel bone ke ŝi estis enmetita en Norvega Esperantisto, kio donis al ŝi kuragon daŭrigi la studadon de la internacia lingvo. La rakonto estis tre amuza kaj bona kaj Brynhild Østmo ricevis fortan kaj merititan aplaŭdon.

Einar Gustavsen prizorgis la «10-miutan lingvan instruadon». Li klarigis pri la varieblecoj de la partopreno.

2/2. 67. Dum la programero «Nova jaro — nova agado» la prez. John Berggren diris ke nia laboro en la nova jaro koncentriĝu en jenaj 3 punktoj: Havigi multajn novajn membrojn — precipe junulajn; perfektigi en la lingvo, kaj interna informado pri Esperanto, tiel ke ĉiuj membroj have argumentojn en diskutado pri nia lingvo. Tiucele la klubo estraro decidis dediĉi la venontan klubkunvenon 20/2 en Deichmanske al diskutado norveglingve por kaj kontraŭ Esperanto.

Bedaŭrinde nia hodiaŭa preleganto Itamar Even-Zohar malsaniĝis, sed oni montris du belajn kolorfilmojn pri Israelo: «Israelo — lando de 1 000 vizaĝoj» kaj «La Tria Templo» pri la konstruigo de Israelo kaj pilgrimado al Jerusalemo.

20/2. 67. Kiel reprezentanto de NEL Kjell Gustavsen ĉestis la jarkunvenon de la Norvega Esperanta Fervojista Asocio en Lille-

strøm 19/2. Li rakontis pri ĝia agado kaj bona ekonomio pro subteno de N.S.B. Interalie ili kunlaboras pri faka terminaro kaj eldonas broŝurojn esperant- kaj norveglingve.

La hodiaŭa kunveno estis dediĉita al diskutado por kaj kontraŭ Esperanto kun la celo havi la plej bonajn kaj taŭgajn argumentojn en la propagando por la internacia lingvo. Otto Prytz enkondukis kaj multaj el la ĉestantoj partoprenis la diskutadon.

Nia manskribita gazeto «La Vagabondo» reaparis, tre bone redaktita de Pepita de Caspary. Ĝi enhavis humorajn kaj seriozajn erojn — ankaŭ poemon.

La Esperantoklubo de Bergen.

Kunvenis 21/2. La vicprez. s.ino Leonora Sivertsen gvidis. Nia kutima kunvenago estas jaŭdo, sed niaj estintaj fervoraj klubanoj ges.oj Elna kaj Johan Matland el Sauda vizitis nian urbon, kaj por esti kune kun ili la tago estis ŝanĝita. S-ro Matland sub la titolo «Øst-vest i Budapest» montris lumbildojn, kaj tre interese kaj humore rakontis pri la mondkongreso lastan someron, kaj la travivaĵoj dum la familia aŭtovojaĝo en la najbaraj landoj.

S-ro Matland estis antaŭe multjara prezidanto en nia klubo. Li kaj lia edzino tre fervore agis por ĝi, kaj estis malavantaĝo por nia klubo ke ili antaŭ jaroj translokiĝis. Pro lia antaŭa laboro en nia klubo li ekhavis dum la kunveno nian distingitan signon «Pro Merito», kiun por la klubo s.ino Sivertsen transdonis al li. J. J.

La Urso kunvenis 16/2. Unue okazis elementa instruado. Laŭ instigo de Rosbach la taggazeto «Sarpn» kolektis per listo 210 kronojn kiuj estis sendataj al Firenze.

S-ron Nils Kr. Stenseth oni elektis kiel reprezentanton al «Folkeopplysningsrådet». La prez. priparolis la eŭropan Espo-Kongreson en Innsbruck okazontan ekde la 23-a ĝis la 30-a de julio.

La nova libro ĉifoje estis: «Kie boacoj vagadas». Al la urba Biblioteko li estis proponinta kvar noveperintajn Espo-librojn por havigo. Plie li entreprenis Esp-okurson en «Sarpn».

2/3. Rosbach instruis pri la sufiksoj «ul — il — ig — ist». La instruado vigliĝis per desegnaĵoj. Estis referata letero de Firenze per kiu la tiea Esp.-oklubo dankis pro ricevitaĵoj poŝtmarkoj.

30/3. En al duonhora instruado estis traktata la sufiksojn ejo-ujo.

La prez. parolis pri la kursoj en Elsinoro. La junulara grupo de la klubo estris la programeron pri Israelo, nunjara Kongreslando. Nils Kr. Stenseth ludis gromofondiskon kaj parolis pri israelaj artoj. Erik Fjeld priskribis la malfacilan situacion en kiu troviĝas Israelo flanke de siaj najbaroj.

«La Norda Stelo», Hamar.

20/1 membroj de La Norda Stelo partoprenis la kunvenon de «La tri Steloj», Esp. klubo en Løten. La prezidanto, s-ro Krogstie, deziris bonvenon, kaj esprimis la esperon pri daŭra kunlaboro inter la esp. kluboj in Løten kaj Hamar. Li montris siajn tre belajn kolorlumbildojn, faritajn dum diversaj esp.kongresoj Post agrabla kafotinkado ni reiris al Hamar, ege kontantoj pri la tona esperanta kunesto.

UNESKO- novaĵoj

500 JAROJ DA LIBROJ

La Brita Muzeo, kiu posedas unu el la tri plej grandaj kolektoj de presitaj libroj en la mondo, ĵus finis eldoni sian ĝeneralan katalogon, kiu ampleksas 500 jarojn ekde la prakomenco de presado en Britujo ĝis 1955.

La katalogo enhavas pli ol 4 milionoj da enskriboj, en 263 grandaj volumoj, kaj ĝi estas ĝis nun la plej granda eldonaĵo de la mondo. Kvankam necesis sep jaroj por pretigi ĝin, tio fakte estas fulmorapida laboro por tiaŝpeca entrepreno. Pli frua klopodo de la Brita Muzeo, komencita en 1931, atingis nur ĝis la litero D en 1954, kiam oni rezignis pri ĝi. La eldono ĉi-foje estis pli rapida, ĉar oni evitis preskaŭ la tutan redaktan laboron, farante foto-litografan eldonon de la normale uzata katalogo en la Legoĉambro.

La eldonnombro estis po 750 ekz. por ĉiu volumo. La kompletan jam ricevis bibliotekoj en 40 landoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

ENCIKLOPEDIA DE MONDA LITERATURO

Germana firmo komencis eldoni enciklopedion de la monda literaturo ekde la plej fruaj tempoj ĝis la hodiaŭa epoko. La

11a IS okazos en Würzburg

La 11a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo okazos de 27/12-67 ĝis 3/1-68 en la universitata urbo Würzburg (Main). La temo estas: Religioj kaj filozofio en la 20-a jarcento. Tiu seminario estas la dua en la serio de 6 seminarioj sub la ĝenerala temo «Esencaj trajtoj en la hodiaŭa mondo».

Partoprenintoj de la lastaj IS-oj «aŭtomate» ricevos la Unuan Informilon, supozeble fine de majo. Aliaj interesitoj petu ĝin de GEJ-estrarano H. Behrmann, Volksschule Süd, 4972 Löhne-Obernbeck.

2a Scienca Konkurso de GEJ

Germana Esperanto-Junularo ankaŭ ĉi-jare aranĝos Sciancon Konkurson lige kun la 11a Internacia Seminario, kiu temas pri «religio, filozofio» kaj kiu okazos supozeble en Würzburg inter 27/12 1967 kaj 3/1 1968.

Per tiu Scienca Konkurso GEJ celas instigi pli vastan nombron de junaj personoj (ĝis 35 jaroj) okupi sin pri la semina temaro.

La kompleta Konkursa Regularo estas trovebla en Germana Esperanto-Revuo n-ro 7/66 sur p. 81 (petu ĝin de Herm. Behrmann, Volksschule Süd, 4972 Löhne-Obernbeck, Germanio). Jen la plej gravaj punktoj:

La konkursoj prezentu siajn tem-proponojn al la Sekretario de la Konstanta Komitato de la IS, Uwe Joachim Moritz, Hafenstr. 75, 44 Münster, Germanio. Post aprobo de la tempropono ili sendu ĝis 1/9 1967 tajpitan manuskripton 10—30 paĝan, en kiu ili traktis problemon el difinitaj kampoj de religio aŭ filozofio kaj en kiu ili prezentas laŭeble tute novajn, modernajn aspektojn. Ili devas havi ĉiujn rajtojn pri la kontribuajo. En kazo de premiigo tiuj rajtoj transiros al GEJ.

GEJ elektos ĵurion, kiu decidas pri la atribuo de 3 premioj.

1a premio: senkosta restado en la 11a IS aŭ egalvaloro; 2a premio: 50 GM; 3a premio: 30 GM. Krome la ĵurio povas atribui al eminentaj junaj talentoj Rekonan Premion.

Laŭeble la premiitoj partoprenu en la 11a IS kaj tie voĉlegu siajn kontribuajojn. La premiitaj kontribuajoj estu eldonataj en formo de kajero aŭ libro.

La estraro de GEJ esperas multnombrian partoprenon en la 2a Scienca Konkurso.

enciklopedio konsistas el ses volumoj kaj enhavas ĉ. 18 000 artikolojn de pli ol 300 aŭtoroj, apartan indkson de la aŭtoroj kaj resumajn priskribojn de pli ol 130 naciaj literaturoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

Korespondu!

35-jara instruisto de literaturo kaj historio volonte korespondus kun iu en Norvegujo. Tóka József, Kossuth L. u. 78, Baranya megye, Abaliget, Hungarujo.

Mi tre deziras trovi amikojn-esperantistojn en Norvegujo kaj Svedujo. Aleksandár Kánev, grad Bracigovo, Bulgarujo.

NORSK ESPERANTO-FÖRBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.32

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefono: 54 727